KOLEKTO "PACO KAJ AMO"

SANTIAGO RUSIÑOL

# LA ĈIAMA KANTAĴO

(LA CANÇÓ DE SEMPRE)

TRADUKITA

DE

ALFONSO SABADELL

BARCELONO 1910ª

PREZO

10 Sd.

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

16x1970 hf002100nf

Kolekto PACO KAJ AMO

# LA ĈIAMA KANTAĴO

DRAMDIALOGO DE

## SANTIAGO RUSIÑOL

UNUAFOJE PREZENTITA EN BARCELONO EN LA KATALUNA TEATRO (ROMEA)

LA 29an DE MAJO 1906a

EL LA KATALUNA LINGVO KUN PERMESO DE LA AŬTORO

TRADUKIS

ALFONSO SABADELL

Prezidanto de la GRUPO ESPERANTISTA BARCELONO
kaj
Membro de la LINGVA KOMITATO

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

— 1910 —

Presejo Josefo Doria. — strato Ros de Olano, 4, Barcelono.

2100

## AL LA GRUPO ESPERANTISTA

## "Barcelono"

*Bonvolu akcepti, karaj gelernantoj kaj amikoj, tiun ĉi malgrandan tradukon, kiun mi kore dediĉas al vi, kaj kies nura celo estas, la tra la mondo disvastigado de kataluna literaturo, per Esperanto.*

*LA TRADUKINTO*

ĈIUJ RAJTOJ REZERVITAJ

## PERSONOJ

PIEROTO.

KOLOMBINO.

# AKTO SOLA

*La agado havas lokon en subtegmento. Granda fenestro, el kie oni vidas la ĉielon dum la sunsubiro kaj grandan dubebluan urbon. Malriĉaj mebloj ornamas la ĉambron. Kolombino maŝinkudras blankan silkan veston. En alia flanko Pieroto apud tableto kaj duone sternita sur malnova sofo, havas plumon en la mano kaj rigardas la plafonon.*

## NURA SCENO

KOLOMBINO

Kion ci faras, Pieroto?

PIEROTO

Kion ci volas, ke mi faru? Mi serĉas rimon, kiun mi perdis.

KOLOMBINO

Kaj kie ci serĉas ĝin?

PIEROTO

Tie, kie estas ĉiuj rimoj, en la nuboj; sed kiel de ĉi tie oni ne vidas la nubojn, mi devas agi kiel la hirundoj: ilin serĉi sub la trabaro.

KOLOMBINO

Ĉu tiel supre estas la rimoj?

PIEROTO

Ĉu ci ne vidas ke sur la tero, ilin balaas la homoj praktikaj de la vivo? Ili aliras al la puntoj de la araneaĵoj, al fendoj de trabetoj, kaj nur la poetoj konas ilin tie. La poezio estas tiel persekutita, ke baldaŭ estos pli malfacila trovi rimon, ol duron.

KOLOMBINO

Kaj kion ci verkas?

PIEROTO

Iluziojn. Mi dezirus rimigi aferojn, kiuj ne rimas: amon kun mono, mizeron kun gajeco, ĝojon kun doloro, kaj mi vidas ke mi perdos la inkon.

KOLOMBINO

Neniam ci estos saĝa, Pieroto.

PIEROTO

Mi ja ne deziras esti tia. La saĝeco ne estis farita por ni, kaj se ci dubas pri tio, rigardu cin sur spegulo, se iun ci trovas: ci estas malgaja de kiam ci mastrumas. Antaŭe, kiam ci kaj mi ne havis, kion ci nomas saĝeco, tie ĉi estis kisa kaĝo. Se la muroj havus eĥon kaj se ili parolus, ĉi tie estus fariĝinte kvazaŭ arbo sur kiu aliras la birdoj por dormi. Nun fariĝinte saĝa, tie ĉi estas tiom da honesteca malvarmeco, ke anstataŭ Pierota nesto, ĝi similas al laika oficejo.

KOLOMBINO

Oni devas pensi pri la estonteco, Pieroto.

PIEROTO

La morgaŭon! Ĉu ne sufiĉas la nombro de tiuj, kiuj pripensas, kion ci nomas morgaŭo, por ke eĉ ni ankaŭ tion faru? Malbenita morgaŭ! Ni rigardu la postmorgaŭon, ĉar almenaŭ ni pli malproksime rigardos!

KOLOMBINO

Ni devas esti singardemaj, Pieroto.

PIEROTO

La singardemo! Ĉu ci scias, kio estas singardemeco? La senkulpigo de la malkuraĝuloj. Tiu ĉi kalkulinfektado mortigos la malmultan posedaĵon de tiuj, kiuj, kiel ni sensaĝe naĝas sur tiu ĉi larmvalo; ĝi mortigos nian esperon, kiu ja estus antaŭsciiginte nin, ke eĉ ci, ci Kolombino, devus enkotiĝi en la ordan marĉejon!

KOLOMBINO

Silentu!...

PIEROTO

Ĉu ci ne tion vidas? Kuntirita apud tiu ĉi kudromaŝino, ci perdis la ridadon, perdos la kantadon; ci velkos kiel la folioj, kaj tiuj ĉi okuloj, kiujn ci havas kiel du morusoj, kiuj rimas kiel kantaĵo, heliĝos iom post iom, pro la seninterrompa rigardado al blanka tolaĵo.

KOLOMBINO

Ni estas malriĉaj...

PIEROTO

Ci jam estas malriĉa: mi ankoraŭ ne. Dum mi ne timos pro la mizero, mi tia ne estos.

KOLOMBINO

El kio ci vivos?

PIEROTO

Per la falantaj panmolaĵetoj, per la arboskuitaj fruktoj, per la vesperiĝa heleco, per la lumo, per libereco, per la arbara bruo, per malsato, el kio ajn ĝi estos. Per ĉio, escepte esti ordama.

KOLOMBINO

Ĉu ci jam scias, kion ci diras?

PIEROTO

Kaj kion mi faras. Mi ne volas degradi la metion, la dotaĵon de la sankta inspiro.

KOLOMBINO

Aj, kompatinda Pieroto!

PIEROTO

Mi havas rimedon, antaŭ ol degradiĝi per ordameco...

KOLOMBINO

Kiun rimedon ci havas?

PIEROTO

Morti.

KOLOMBINO

Kial ci parolas tiel?

PIEROTO

Ĉar Pieroto havas sian fatalon: kanti kantaĵojn por la aliaj, aŭ gaje morti.

KOLOMBINO

Do, mi deziras vivi, kaj ne gaje. Pieroto, mi saĝpensante volas vivi.

PIEROTO

Aj, mia kompatinda Kolombino!

KOLOMBINO

La iama gaja kaj freneza Kolombino, estas hodiaŭ alia. Anstataŭ lerni sin ornami per floro, ŝi lernis alfabeton; anstataŭ danci ŝi kalkulas; anstataŭ paseroj interne ŝia kapo, ŝi havas en ĝi ciferojn.

PIEROTO

Kompatinda!

KOLOMBINO

Ĉu ci scias, kion mi deziras posedi? Ĉambreton provizita per blankaj kurtenaroj, tegitajn seĝojn, familiajn portretojn sur la muroj...

PIEROTO

Kaj konkornamitajn florvazojn.

KOLOMBINO

Eĉ tiujn ĉi florvazojn. Tute same kiel ci diris. Mi aspiras esti ordema, ŝparema, kaj fari ŝtrumpon...

PIEROTO

Procentedoni...

KOLOMBINO

Je ses pro cento.

PIEROTO

Eĉ posedi kampardomon.

KOLOMBINO

Jes, kampardomon; ruĝajn fiŝojn, teraseton, lavejon, pumpilon, kolorigitajn vitrojn...

PIEROTO

El ĉio escepte florojn: ĉu ne vere?

KOLOMBINO

La floroj por la festaj tagoj.

PIEROTO

Silentu, silentu, ĉar mi estis tuj dironta al ci, kion mi ne deziras.

KOLOMBINO

Diru. Kion ci deziris diri al mi?

PIEROTO

Burĝino!

(*Pieroto malproksimiĝas kaj sin kubutapogas sur la tablo. Kolombino forlasas la laboradon alprosimiĝante al li.*)

KOLOMBINO

Ĉu ci ekkoleris? Ĉu ci ne komprenas, ke mi tion diras por ke ci koleru? Cu ci ne amas min, Pieroto?

PIEROTO

Jes.

KOLOMBINO

Kion ci faras?

PIEROTO

La ĉiamaĵon: mi revas.

KOLOMBINO

Ĉu ci sendorme revas?

PIEROTO

Ĉiam mi revas sendorme. Sonĝi dormante estas nur duone sonĝi: oni ne povas direkti la sonĝojn.

KOLOMBINO

Kaj, kiujn revojn ci volas sekvi?

PIEROTO

Meti la vivon en versojn, dum sieĝas min la prozo.

KOLOMBINO

Kaj kial ci ne plenumas cian deziron per la laborado? Ĉu mia ekzemplo nenion diras al ci?

PIEROTO

Ĝi diras al mi, ke ni estas sklavoj; ke ci estas sklavino; ke ciaj fingroj, kiuj estas por depreni rozojn, devas labori por la aliaj.

KOLOMBINO

Estas dornoj ankaŭ en la rozoj.

PIEROTO

Sed la kudrilmaŝinoj havas kudrilojn, kaj ili estas ŝtalaj: ili ne parfumas.

KOLOMBINO

Kial ci ne venas por helpi nin, kiuj deziras labori?

PIEROTO

Mi deziras helpi vin pli, ol ci pensas.

KOLOMBINO

Ĉu versfarante?

PIEROTO

Jes, versfarante.

KOLOMBINO

Dio diris, ke ni laboru.

PIEROTO

Dio diris, ke ni gajnu la panon per ŝvito de nia frunto.

KOLOMBINO

Tiel, do, la laborado estas virto.

PIEROTO

Tiel, do, ĝi ne estas virto: ĝi estas puno.

KOLOMBINO

Punon, ĉu ci diras?

PIEROTO

Punon, nomita virto, de tiuj, kiuj devigas nin laboradi.

KOLOMBINO

Kaj kiel ni, la malriĉuloj, devas perlabori?

PIEROTO

Lasante ke oni trompu nin per la laboro, ĉiam kredante ke ĝi estas virto.

KOLOMBINO

Silentu, Pieròto, kaj ne senkuraĝigu min.

PIEROTO

Naivulino! Mi jam same kiel ci amas la laboron: sed ne perforte laboradi. Mi deziras ke ĝi estu plezuro kaj ne puno! Ke ĝi estu kantiko kaj ĥoro! Ĝi devas esti donaco por ornami mian vivon!

KOLOMBINO

Kion ci intencas diri?

PIEROTO

(*Alproksimiĝante al Kolombino.*)

Aŭskultu, aŭskultu, mia Kolombino. De post kvar tagoj ci kudras; ci kudras dum la tago kaj nokto, ĉiuhore; la suno leviĝas, ĝi subiras, la tago sin ornamas sen tio, ke ci ĝin rimarku; la nokto pleniĝas je steloj kaj ci ilin ne vidas; malproksime, certe floras la arboj, kaj neniu floro ekfloras por ciaj okuloj. Kaj ci, kiu havas la rajton ĝui ilin, kion ci faras dum eksplodas tiu ĉi ĉarma printempo?

KOLOMBINO

Ci ĵus tion diris: mi kudras.

PIEROTO

Kaj kion ci kudras?

KOLOMBINO

Robon por fianĉino.

PIEROTO

Ĉu por ci?

KOLOMBINO

Por... ŝi.

PIEROTO

Por la aliaj. Por iu, kiu nomos virto, se ŝi tion diras, nian malriĉecon; por iu, kiu triumfe ĝin survestos, kaj

survestos ĝin... virte; por ŝi, kiu ne rememoros, ke en tiu ĉi subtegmenta anguleto estas virta nesto; nesto, kiu viglas dum estas printempo; nesto, kiu ne kantas por ke ili kantu; nesto, kie oni ne havas tempon por plori, ĉar plorante oni perdas horojn.

KOLOMBINO

Nu, kion do, ni devas fari?

PIEROTO

Ci ne kredus al mi. Kiam la Pierotoj konsilas, tiam ili ridigas.

KOLOMBINO

Mi neniam ridas pri ci, Pieroto.

PIEROTO

Nu, kantu kune kun mi: faru kantaĵon...

KOLOMBINO

Por kiu?

PIEROTO

Por tiuj, kiuj laboras kaj suferadas; por tiuj, kiuj estas malgajaj sur la tero pro manko de koroj ilin gajigantaj.

KOLOMBINO

Kaj ĉu ni estas gajigontaj ilin?

PIEROTO

Kiu devas ja esti, se ne estas la Pierotoj? Ĉu ci ne vidas

kiel ĉiuj hodiaŭ laboras por malgajigi la mondon? Ke ĉia homelpensaĵo estas por pli rapide alporti la malgajecon per ŝnuretoj, tra la aero, tra ĉie? Ke la homo lernas ĉiujn lingvojn por transdoni la malgajecon plej malsammaniere? Ke li freneze kuras por pli rapide alporti la malbonan novaĵon? Ĉu ci ne vidas ke eĉ nin Pierotojn, oni dezirus jungi al maŝino, kaj fari el ni maŝinon, kaj meti al ni transigajn rimenojn anstataŭ nervoj, vaporkaldronon anstataŭ koro, kaj fari automatecan horloĝon el tio, kion oni nomas spirito?

KOLOMBINO

Estas vero.

PIEROTO

Tamen, tio ne estas ebla, Kolombino. Se ekzistas nigraj homoj, kiuj laboras, devas ankaŭ ekzisti blankaj Pierotoj, ilin liberigantaj, ermitoj de la gajeco, predikantoj de la senordeco, ekzekutistoj de la komuna saĝo, ĝardenistoj de la idealo, kiuj meze de tiom da fruktejoj, gardu la florojn de la poezio.

KOLOMBINO

Kaj kion ni devas fari por ĝin atingi?

PIEROTO

Sekvi la martirvojon de la Pierotoj, kondamnitaj al ĉiuj malŝatoj; aŭskulti la rikanadon de la nekonitoj ambaŭflanke de la vojo; fiere trapasi meze de la seriozaj malsprituloj; vidi la rideton de la grasuloj; suferi la haladzon de la satuloj; forkuri de la oro de la riĉuloj; juĝi kvazaŭ-

homoj tiujn, kiuj deziras gardi sian grenon; alveni al hospitalo de la malgajuloj, kaj tie fari serenadon sur la sojlo.

KOLOMBINO

Aj, Pieroto! Kaj kion ni manĝos vojirante?

PIEROTO

Kisojn.

KOLOMBINO

Kaj kiel ni dormos?

PIEROTO

Ĉirkaŭpremitaj.

KOLOMBINO

Kaj se ni havos Pierotidojn?

PIEROTO

Ni malfermos la kaĝon, kaj ili flugu.

KOLOMBINO

Tio ne povas esti, kion ci revas?

PIEROTO

La oferoj ŝajnas revoj, laŭ la hodiaŭa ŝanĝiĝo de la homoj. Kaj mi petas de ci la plej grandan oferon: la ofero ridigi, kaj ridante pensigi la popolon, kaj per la pensado ĝin liberigi. Venu kun mi kaj forlasu la kudromaŝinon. (*Prenas ŝin per la mano kaj kondukas ŝin al la fenestro.*) Venu kun mi, kaj rigardu. Kion ci vidas?

KOLOMBINO

La urbon.

PIEROTO

Kaj sur la ĉielo, kion ci vidas?

KOLOMBINO

La sunsubiron.

PIEROTO

Kaj meze de tiu ĉi malheleco, kion ci vidas tie funde?

KOLOMBINO

Blukoloran linion.

PIEROTO

Tiu ĉi linio estas homoj, kiuj finis la laboron, kiuj forlasis ĝin. Ĉu ci vidas iun blankvestitan kiel ni? Ĉu ci vidas iun disigantan de la aliaj?

KOLOMBINO

Ĉiuj estas samaj.

PIEROTO

Kaj ĉu ci ne scias, kial ĉiuj estas samaj? kial ĉiuj similas kvazaŭ armeo? Ĉar ĉiuj estas sammaniere malgajaj, kaj la malgajeco faras ŝafaron el la malgajuloj.

KOLOMBINO

Ci estas prava.

PIEROTO

Rigardu: ĉu ci vidas kelkajn, kiuj disiĝas kaj levas la brakojn supren? Ĉu ci ne scias, kial ili rigardas malproksimen? ĉar ili kantas.

KOLOMBINO

Jes, tio estas certa.

PIEROTO

Kaj ĉu ci aŭdas, kion ili kantas?

KOLOMBINO

Ne.

PIEROTO

Ili kantas unu el miaj kantaĵoj.
(*La ĥoro ekkantas malproksime.*)

KOLOMBINO

Vere. Ĝi estas tiu, kiun ci verkis en miaj brakoj.

ĤORO

Se ni volas liberecon
gajan kaj eksplodigantan,
nur kantante ĝin atingos
Kuraĝeme ni laboru,
ni laboru, sed kantante.

PIEROTO

Ho! ĉu ci aŭdas? Ili kantas, kantas liberecon, amon, fratecon, junecon kaj ĝojon; ĉion, kion oni ne povas diri

per prozo. Atentu kiel ili jam ne estas ŝafaro, kiel el ĉiuj krioj eliras harmonia movado!

ĤORO

Se ni volas liberecon
gajan kaj eksplodigantan,
nur kantante ĝin atingos.
Kuraĝeme ni laboru,
ni laboru, sed kantante.

PIEROTO

Jes! Por ili ni devas labori! Por ili devas esti niaj kantaĵoj! Por tiuj, kiuj suferas kaj esperas! Ni iru ilin helpi, Kolombino! La hodiaŭaj Pierotoj ne devas kudri por la riĉuloj: ili devas kanti por la malriĉuloj.

*(Ili foriras kurante kaj ĉirkaŭpremante sin reciproke.)*

KURTENO